# NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jmgiaa@gmail.com)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 619.694.683 (Iciar)
☎ 658.709.087 (Jesús)
esperantobi@gmail.com

TTT-ejo: https://sites.google.com/site/esperantobi/home

**Jar-kotizoj**: Normala: 60 €. Familia: 70 €.
**KUTXABANK(BBK)-konto. Kodo IBAN: ES56-2095-0141-4122-1800-1550**

**APRILO/JUNIO 2017** **Nro. 111 (2/17)**

## ASAMBLEA GENERAL ORDINARIA.

Por la presente, y según exigen sus estatutos, se convoca la asamblea general ordinaria del Grupo Esperantista de Bilbao para el próximo **viernes 26 de mayo, a las 19,30 h.**, en su sede de Barrencalle Barrena, 7-1º dcha., con el siguiente

**Orden del día**:

1. Lectura y aprobación, si procede, de las actas de la asamblea general anterior (20/05/2016).
2. Aprobación, si procede, del resumen de gastos e ingresos del año 2016.
3. Aprobación, si procede, del presupuesto para el año 2017.
4. Informaciones varias.
5. Ruegos y preguntas.

## ĈIUJARA ĜENERALA KUNVENO.

Tiel kiel vi povas legi ĉi-supre, la **vendredon 26-an de majo, je la 19,30 h.**, oni okazigos la ĉiujaran ĉiesan kunvenon. Ni ne bezonas substreki ke la partopreno de vi ĉiuj en la decidotaj aferoj, kiuj tuŝas nian Grupon, estas ege grava.

**TAGORDO**:

1. Legado kaj aprobo, se indus, de la protokoloj de la lasta kunveno (20/05/2016).
2. Same pri la spezoj de la jaro 2016.
3. Same pri la buĝetpropono por la jaro 2017.
4. Diversaj sciigoj.
5. Proponoj kaj sugestoj.

# LOKE ...

## NOVA KURSO DE ESPERANTO.



La 10-an de marto komencis en nia sidejo nova kurso de Esperanto gvidata de nia samrondano David Redondo. Al ĝi aliĝis 13 homoj, kvankam ne cxiuj povas persone cxeesti; tamen, 10 el ili regule partoprenas la lecionojn.


Jam de antaŭ 4 jaroj ni ne organizis kursojn; pro tio, temas pri grava okazintaĵo cele al engaĝiĝo de novaj homoj al nia Grupo.

La unuan tagon, David okazigis lunĉon por malstreĉigi la kutiman nervoziĝon de tiu unua tago kaj ekkonatigi la novulojn kun Esperanto kaj kun la E-Grupejo. Tre brila elpenso!

La lernolibro uzata en la kurso estas tiu de Miguel Gutiérrez Adúriz, kune kun lia vortaro, la nova eldono de “Amika”.

## PREZENTADO DE LIBRO.

La pasintan 30-an de marto, en la urba biblioteko de Sestao, okazis la presentado de la libro “La forfuĝintoj de la fortreso de Ezkaba (San Kristobal)”. Tiu amasa forfuĝo okazis en majo 1938 kaj en ĝi elstare rolis **Esperanto**, tiel ke nia lingvo estis la “sekreta” lingvo uzata de la organizantoj de la fuĝo por ke la planoj ne estu malkaŝotaj de la gardistoj.




Pri la okazintaĵo skribis artikolon nia amiko Toño del Barrio:
http://www.delbarrio.eu/blo/2013/05/un-idioma-para-fugarse/
http://www.liberafolio.org/2013/esperantisto-gvidis-fugon-el-prizono-de-franco

Post kunvoko pere de retposxto, la eventon ĉeestis 5 membroj de nia E-Grupo, kiuj havis la okazon interparoli kun la ege afabla kaj simpatía aŭtoro de la libro, Fermín Ezkieta, kiu partoprenos ankau la teruelan kongreson de HEF.

Mirinda estis la multnombra cxeestantaro: inter 80 kaj 100 homoj.

## CUOTAS DEL AÑO 2017.

Cuando queráis, podéis hacer el pago de vuestra cuota anual. El número de cuenta está en la primera página de este “Nia Ponto”. Y no olvidéis **las cuotas vigentes**:

Cuota normal: 60,00 € anuales. (5 € al mes)
Cuota familiar: 70,00 € anuales. (5,83 € al mes)

## "CAPTAIN FANTASTIC".

La pasintan 4-an de majo, la kulturfako de la Magistrato de Portugalete organizis senpagan spektadon de la filmo "Captain fantastic". Kiel jam sciate, ĉar la novaĵo estis vaste dissendita tra la reto, en ĝi la aktoroj parolas en Esperanto dum iom malpli ol unu minuto.

Krom tio, certe temas pri spektinda filmo kiu pritraktas unu el la aferoj, pri kiu oni aŭdas ofte paroli en la amaskomunikiloj kaj en la socio ĝenerale: la porinfana eduksistemo. Sed ne nur: aliaj aferoj pritraktataj estas ekologismo, la kapablo mem solvi la proprajn problemojn, …

Temas pri komerca filmo, kies ĉefa rolulo estas la mondkonata Viggo Mortensen, sed kiu apartenas al tiel nomataj "sendependaj" usonaj filmoj. Eble pro tio, ne facilas trovi ĝin en la programaro de normalaj kinejoj. Tamen, se vi havas la okazon, spektu ĝin; certe vi ĝuos.

## VENONTAJ E-ARANĜOJ.

**23-25 jun. 2017**. Kongreso de Hispana E-Federacio (HEF) en Teruel.

**22-29 jul. 2017**. Universala Kongreso de Esperanto, UK-2017 - en Seulo, Suda-Koreio.
Inf.: x, rete: - Retejo ĉe UEA: http://www.uea.org/kongresoj/

**5-12 aŭg. 2017**. IJK, Internacia Junulatra Kongreso - en urbo Aneho en Togolando.

**25-31 jul. 2018**. Universala kongreso en Lisbono (Portugalio).

## INTERNACIA SEMAJNO DE KULTURO KAJ TURISMO.




Unu el la plej tradiciaj kaj sukcesaj renkontiĝoj organizataj en la Iberia Duoninsulo, la Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo, atingas en 2017 sian 25an eldonon, kun nova organiza skipo.

En tiu ĉi jaro ĝi okazos de la 30a de septembro ĝis la 7a de oktobro en la urbo Tossa de Mar, en la t.n. 'Costa Brava' (laŭlitere: Sovaĝa Marbordo, duonvoje inter Barcelono kaj la franca landlimo). Ĉi tiu bela urbeto, antaŭe fiŝkaptista vilaĝo, nuntempe estas plejparte turisma loko, tre vizitata.
Pliajn detalojn kaj aliĝilon oni povas trovi ĉe: https://kulturacentro.blogspot.com.es/

*(La Bitbulteno de HEF. Nro. 35. 12/03/2017)*

**NO LO OLVIDES: EL VIERNES 26 DE MAYO, A LAS 19:30 h., ASAMBLEA GENERAL DEL GRUPO.**
**LA PARTICIPACIÓN DE TODOS ES MUY IMPORTANTE, ASÍ QUE ESPERAMOS TU ASISTENCIA.**

## PLIE PRI LA HISPANA KONGRESO EN TERUEL.




Fine de la unua aliĝperiodo jam 75 homoj konfirmis sian ĉeeston en la 76a Hispana Kongreso de Esperanto, kiu disvolviĝos de la 23a ĝis al 25a de junio en Teruelo.

La 3an de marto, la prezidanto de la LKK, Alberto Granados, kaj la prezidanto de HEF, José Antonio del Barrio, prezentis al la lokaj amaskomunikiloj la bazajn liniojn de la Kongreso. La novaĵo estis publikigita en la tri ĉefaj lokaj kaj regionaj ĵurnaloj, Diario de Teruel, Heraldo de Aragón kaj El Periódico de Aragón, kaj ambaŭ estis intervjuitaj en la radiostacioj Cadena Ser kaj Radio Nacional en Teruelo.

Oni anoncis tie ke la urbestrino de Teruelo inaŭguros la kongreson vendrede vespere, kaj ke sabate matene oni atribuos la nomon “placo de Esperanto” al spaco en la urbo. La detala provizora programo aperas jam en la retejo de la kongreso, kaj ĝi entenas ekspoziciojn, muzikajn koncertojn, prelegojn, astronomian observadon, kunvenojn, turismajn vizitojn kaj multajn aliajn aktivadojn.

Oni krome antaŭvidas renkonton por komencantoj kaj turisman viziton la antaŭan tagon, 22an de junio. Seminario por aktivuloj la 26an kaj 27an kompletigos la aktivadojn por tiuj kiuj povos resti por ĝui la urbon.

La 21an de junio oni organizos publikan prezentadon en Madrido. Tiuj personoj alvenantaj el aliaj landoj, tra Valencio aŭ Barcelono, povas skribi al la Federacio por ke ni metu ilin en kontakto kun lokaj esperantistoj, por organizi aktivadon aŭ viziton al la koncerna urbo, kaj por faciligi komunan vojaĝon al Teruelo, se eble.

Ni rememorigas ke, krom la Jaron Zamenhof, ni kunmemoras en tiu ĉi jaro la 800-jaran datrevenon de la legendo de la Geamantoj de Teruelo. Tiu ĉì estos kongreso de amantoj… amantoj de Esperanto.

Pliaj informoj http://www.esperanto.es/kongreso.
Kaj por aliĝi: http://www.esperanto.es/kongresaligo

*(La Bitbulteno de HEF. Nro. 35. 12/03/2017)*

## JUNULAJ RENKONTOJ.

Nia junulara sekcio, HEJS, partoprenas en projekto de la Eŭropa Unio, organizita de la tutmonda asocio TEJO, pri efika komunikado por junularo. Du junuloj el Hispanio partoprenos en la evento PEKO, organizita de skolta asocio, kaj trejniĝos pri tiuj ĉi du temoj: kiel paroli kun diversaj aŭdiencoj (aĝgrupoj, personecoj, ktp) kaj kiel varbi/vendi ideojn. Venos pli postaj eventoj, kaj se vi estas juna, malpli ol 31 jaraĝa, kontaktu kun HEJS por senpage ilin partopreni. La posta evento okazos en Hispanio, en Teruelo, la 26an kaj 27an de junio, tuj post la Hispana Kongreso.

Krome, HEJS, kune kun la Kataluna Esperantista Junularo, decidis kandidati por organizado de la Internacia Junulara Kongreso de 2018, en la urbo Badaĥozo (Badajoz), profitante ke la tiujara UK okazos en Lisbono (Portugalio). Se vi estas juna (aŭ se vi ne estas tiom juna kaj pretas helpi, speciale se vi loĝas proksime), bv kontakti kun HEJS, hejs@esperanto.es, por kunlabori kun la organiza skipo.

*(La Bitbulteno de HEF. Nro. 35. 12/03/2017)*

## LIBROSERVO DE HEF.

Hispana Esperanto-Federacio profitis la komencon de la Jaro Zamenhof por renovigi sian Libroservon. Okaze de tiu ĉi jaro, ni proponas rabaton de la biografio de Dro. Zamenhof, “El hombre que desafió a Babel”.
Vidu liston de prezoj (inklude de rabatoj por membroj de HEF) kaj manierojn ilin akiri, ĉe: http://www.esperanto.es/hef/index.php/aprender-esperanto/venta-de-libros

*(La Bitbulteno de HEF. Nro. 35. 12/03/2017)*

## LEGADO DE DONKIĤOTO

Kiel jam tradicie, en aprilo okazos la publika legado de Donkiĥoto en kultur-institucio “Circulo de Bellas Artes”. Ankaŭ esperantistoj partoprenos, la 22an de aprilo, sabate, je la 7a, per laŭtlegado de kelkaj paragrafoj de la verko en Esperanto.

*(“Nia Voĉo”. Organo de Madrida E-Liceo. Aprilo 2017)*

## KER-EKZAMENOJ EN JUNIO

La organizaĵo “edukado.net”, kun apogo de UEA, kunvokis por la monato junio mondan sesión de ekzamenoj de Esperanto laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER). Laŭ tiu ĉi modelo, la skriba kaj parola partoj estas aparte organizataj. Por la 10a de junio oni programis la skriban ekzamenon samtempe en diversaj urboj de la mondo. Unu el la sidejoj estos **Zaragozo**, kien povos vojaĝi ĉiuj interesitoj. La parola ekzameno estos celebrata dum la Hispana Esperanto-Kongreso kiu disvolviĝos du semajnojn poste, la 24an de junio, en proksima urbo Teruelo.

Por pliaj informoj: http://edukado.net/ekzamenoj/ker. Interesatoj kaj kandidatoj, bv. skribi al la adreso kurso@esperanto.es.

*(“Nia Voĉo”. Organo de Madrida E-Liceo. Aprilo 2017)*

## KOMUNA LEGADO DE DON KIĤOTO.

Alejandro Pareja Rodríguez kaj Darío Mora Garcés legas du fragmentojn de la verko Don Quijote, en la kutima komuna legado de la verko, kiun ĉiujare organizas la "Círculo de Bellas Artes" de Madrido. Kun la legata teksto.
https://youtu.be/wDrhBFX1X1E

*(María Zocato. 21/04/2017)*

## 100 homoj jam aliĝis al la teruela kongreso.

Ni atingis la numeron 100! Cento da homoj aliĝis jam al la 76 Hispana Kongreso de Esperanto (Teruelo, Aragono, 23-25 junio 2017, plus antaŭ- kaj post-kongreso). Numero 100 fariĝis ĝuste nian plej veteranan samideanon, Eduardo Larrouy, kiu neniam mankas, eĉ se nur kiel apogo.
Aliĝis jam homoj el dekduo da landoj el 4 kontinentoj. Vidu la liston ĉe: http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso/listo-de-aligintoj
Pliaj informoj: http://www.esperanto.es/kongreso
Pri la urbo kaj ties legendoj: http://sezonoj.ru/2017/03/hispanio-5/

*(José Antonio del Barrio. Hispana Esperanto-Federacio. 25/04/2017)*

## La Prezidanto de HEF en la Kongreso de Deputitoj.

Hieraŭ, danke al la trafega iniciato de Rikardo Biurrun, mi sciis ke hodiaŭ la Kongreso de Deputitoj organizos prezentadon de ekzempleroj de tradukoj de Don Quijote, donacitaj al ties Biblioteko fare de eksterlandaj ambasadoj Mi fulme kontaktis ilin... kaj ili same fulme reagis akceptante nian tradukon kaj invitante min.

Hodiaŭ, komence de la mateno mi iris al la Kongreso de Deputitoj, por donaci ekzempleron de la traduko de Don Quijote al E-o (ankaŭ de la karto kun la bita versio).

Poste, je la 12-a okazis la publika prezentado de la iniciato, en la "Salón de Pasos Perdidos" de la Parlamento.
La tuta evento: https://www.youtube.com/watch?v=QTMTOf-cIJw

En minuto 10,20 la prezidanto de la Kongreso de Deputitoj dankis nian asocion pro la donaco de la ekzemplero.
Jen resumo: https://www.youtube.com/watch?v=_3S26pdX2cM

En min. 0:14 oni vidas kiel Ana Pastor foliumas nian libron. Poste la parolisto mencias nian lingvon (kaj, jes, iom poste oni eĉ povas videti min :)).

Mi alproksimiĝis al ŝi, kaj dankis pro la mencio. Ŝi fakte dankis nin refoje. Mi ankaŭ parolis kun la direktorino de la Biblioteko, aliaj funkciuloj, du deputitoj (inter ili Felisuco https://twitter.com/Felisuco_ ;-)) kaj aliaj. Nia libro estis tre bone videbla kaj ĉiuj sciis pri la lastatempa aldono.

Jam aperis iuj informoj en la ĵurnaloj (sekve al la gazetarkomuniko de la Kongreso, kie aperas mencio al nia lingvo kiel "idioma inventado"
http://www.elperiodico.com/es/noticias/ocio-y-cultura/congreso-celebra-dia-del-libro-ensalzando-labor-los-traductores-difusion-clasicos-como-quijote-5982040
http://www.lavanguardia.com/vida/20170419/421828061383/el-congreso-celebra-el-dia-del-libro-ensalzando-la-labor-de-los-traductores-en-la-difusion-de-clasicos-como-el-quijote.html

En la intervalo inter ambaŭ aferoj, mi iris viziti la Polan Instituton pri Kulturo, kaj parolis kun la respondeculo de kulturo, Ernest, kiu peris nian inaŭguron en Vallecas. Tre fruktodone: inter alie, li konfirmis ke ili pagos la vojaĝon de Roman Dobrzynski por prezenti la tradukon de "La Zamenhof-strato" en Teruelo, kaj espereble ili mem ĉeestos. Iom marĝene, kaj tre surprize, Ernest sciigis min ke li vojaĝis al insulo La Palma, ĉar lia fianĉino devenas el tie, kaj li trovis informon en la loka muzeo pri esperantista grupo en 1931. Uf, kia mateno!

*(Toño del Barrio. 19/04/2017)*

## NOVA RETA FORMATO DE BOLETÍN.

Hispana Esperanto-Federacio publikigis lastan numeron de "Boletín" en nova formato, kiel revuo en la reto. Ne temas nur pri la pdf versio, facile atingebla de la membroj de la asocio en la interna spaco de la retejo, sed pri bela formato, adaptita al la legado en la reto. Vi povas ĝin aliri en la adreso: http://esperanto.es/boletin/

Por membroj de HEF, eblos aliri la tutan Boletín, enirante en la paĝo pere de via uzulnomo kaj pasvorto (se vi ne havas ĝin, bv. peti al la retejestro esperanto@esperanto.es). Sed dum la venontaj du monatoj, escepte kaj kiel provo, la paĝo estos alirebla por ĉiuj interesitoj. Por tio, utiligu la uzulnomon kaj la pasvorton "prueba".

*("La Bitbulteno" de HEF. N-ro. 36. 06/04/2017)*

## TRA LA MONDO …

## LITERUMILOJ KAJ ORTOGRAFIA KONTROLADO EN EO.

***Lingvoilo*** *(LanguageTool)* estas liberkoda plurlingva programo por kontroli ortografion, gramatikajn erarojn kaj stilon de Esperantaj tekstoj. Ĝi funkcias ankaŭ por pluraj aliaj lingvoj.

"Lingvoilo" atentigas ankaŭ pri eraroj, ne trovitaj per simpla literuma kontrolilo. Estas avantaĝo de Lingvoilo, ke oni povas uzi la programon ne nur en ĝia retejo, sed oni povas elŝuti kromaĵon *(suplementan aldonan programeton)* por sia retumilo. Post la instalado sufiĉas nur marki iun tekston per la muso, kaj la kromaĵo povas tuj indiki la eventualajn literumajn aŭ gramatikajn erarojn... (!)
Prizorganto kaj programisto de Lingvoilo estas Dominique Pelle. - Dankon al li!

**Adreso de Lingvoilo:** https://languagetool.org/eo/
-----
Ekzistas ankau du aliaj, bone funkciantaj literumiloj kaj kontroliloj de ortografio:

– **Lingvohelpilo** ĉe http://visl.sdu.dk/lingvohelpilo/
– **Esperantilo** ĉe http://www.esperantilo.org

*(Lingvo-Studio, L.S.* www.eventoj.hu*. 02/03/2017)*

## Esperantista lando.

Legata en la ĵurnalo “El País”, unu el la plej legataj en Hispanio, ene de artikolo titolita “Atlas de países que no existen” (“*Mondatlaso pri landoj kiuj ne ekzistas*”):

**Moresnet**

Creado en 1816 en torno a una mina de zinc que se disputaban Prusia, los Países Bajos y Bélgica. Rebautizado como **Amikejo**, se convirtió en refugio de los **esperantistas** antes de su desaparición, después de la I Guerra Mundial, con la firma del Tratado de Versalles.

“*Kreita en 1816 ĉirkaŭ zinka minejo, kies propraĵon celis Prusio, Nederlando kaj Belgio. Ree nomita kiel Amikejo, ĝi iĝis rifuĝejo de esperantistoj ĝis ĝia malapero post la Unua Mondmilito, sekve de la Versajla Traktato*”.

*(“El País”. 27/03/2017)*

## Franca verda partio subtenas Esperanton.

Grandan gratulon al la Esperanto-Komisiono de EELV (la franca Verda Partio): La aktuala programo-teksto de EELV estis ĵus eldonita sub la titolo **„Bien Vivre“**-*Vivi Bone*, kaj pri lingvo-politiko ili skribis: "Nous soutiendrons une langue neutre internationale telle que l’espéranto"(“*Ni subtenas internacian neutralan lingvon kiel Esperanto*”).
www.esperanto.eelv.fr/le-projet-2017-deelv-bien-vivre/

*(Manfred Westermayer. 28/03/2017)*

# Subtenu Esperanton ĉe la pola parlamento!

La 7-an de aprilo 2017 la Pola Parlamento per aklamo akceptis rezolucion pri la memorigo de Ludoviko Zamenhof okaze de la 100-a datreveno de lia morto.

S-ino Anna Wasilewska *(parlamentanino el la urbo Olsztyn, neesperantistino)* kiel prezidanto de la *"parlamenta grupo por subteno de la lingvo Esperanto"* preparis la projekton de la rezolucio.

Vi povas subteni la parlamentan poresperantan agadon en Pollando, se vi esprimas vian atenton pri la menciita rezolucio, kaj sendas retpoŝtan gratulon kaj dankon al subaj retadresoj de anoj de la pola parlamenta subtena grupo.

- Anna.Wasilewska@sejm.pl – prezidanto
- Krzysztof.Truskolaski@sejm.pl – vicprezidanto
- Andrzej.Maciejewski@sejm.pl
- Pawel.Bejda@sejm.pl
- Anna.Bialkowska@sejm.pl
- Piotr.Cieslinski@sejm.pl
- Tomasz.Cimoszewicz@sejm.pl
- senator@Czarnobaj.senat.pl
- Grzegorz.Furgo@sejm.pl
- Tomasz.Kucharski@sejm.pl
- Katarzyna.Osos@sejm.pl
- Michal.Stasinski@sejm.pl
- Elzbieta.Stepien@sejm.pl

Jen la ligilo al la koncerna retpaĝo de retpaĝaro de Pola Parlamento: http://www.sejm.gov.pl/sejm8.nsf/komunikat.xsp?documentId=C46335BE3AC0AB56C12580FB0033454D

Dankante vian kunlaboron,Marian Zdankowski, fresxo@gmail.com, Pollando

(Lingvo-Studio, L.S. *www.eventoj.hu*. 15/04/2017)

# SUKCESO DE AMIKUMU.




Post tre malmultaj tagoj, la aplikaĵo Amikumu atingis fulman sukceson. Tiu ĉi apo por saĝtelefonoj ebligas trovi parolantojn de ajna lingvo, sed ĝis nun nur lanĉiĝis por esperantoparolantoj.

Post nur kvar tagoj, registriĝis pli ol tri mil uzuloj. Konsiderante la nombron da alireblaj homoj el la centro de la Iberia Duoninsulo, oni povas kalkuli jam pli ol 100 esperantistojn en tiu ĉi geografia medio.

La aplikaĵo estas libere elŝutebla, kaj jam ebligis la interkonekton de esperantistoj kiuj troviĝis sufiĉe proksime, kaj ne konis unu la alian. Oni atendas grandan sukceson kaj multajn bonajn surprizojn.

*(“La Bitbulteno” de HEF. N-ro 37. 28/04/2017)*